

Paperŝipo eta

*Poemo de Alain Fanchon, Insulo Maŭricio.
Esperanto-versio far Stefano Keller, Svislando.*

Flosu, flosu paperŝipo eta,
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Nenio rapidas pli ĉi-kanale,
branĉetojn, pajlojn, foliojn preterpase.
Borde de l' kanal' kure mi vin sekvas,
spirite, kore, anime unuiĝinte kun vi komplete,
kaj kanalakvo vian sorton, mian sorton gvidas.


Flosu, flosu paperŝipo eta,
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Via flagego busbiletita svingiĝas ventopuŝe,
sur alumeto streĉite staranta fiere.
Mia koro treme batas, ho, se vi renversiĝus!
Kie estas ekfluo akva, kie fino ĝia,
ĉio ĉi estas ĉu nur iluzia?

Flosu, flosu paperŝipo eta,
flosu, flosu miajn revojn transportanta.

Pri danĝeroj grandaj vi estas nekonscia.
Lanĉis viaspecan jam aliaj, ho, kiom da,
kaj tiel faros post mi multaj pliaj da...
La homoj diras, ke l' historio ripetiĝas,
sed esper' mia, kuraĝ' via historion ŝanĝi povas.

Flosu, flosu paperŝipo eta,
flosu, flosu miajn revojn transportanta.



2014

46 ans d'indépendance de l'île Maurice / 46 jaroj de sendependa Maŭricio

 <http://goo.gl/JzGvZA>

pdf <http://goo.gl/JBXrs0> (+_15marto2014.docx,_15marto2014.doc)